# Kion signifas la ripetado de sufiksoj en Esperanto

Probal Dasgupta (Barata Statistika Instituto, Kolkato), Esperantologia Konferenco, Seulo, 27.7.2017

# Ludemo kaj limoj

- Multaj kombinoj aventuraj! Tamen, jen domego kun pluraj *loĝejoj*, ĉu nomi ĝin *loĝejejo*? Vi nomas tirkeston *tablero*, bone, sed ties fakojn – *tablereroj*? Unu homon obsedas mevoj, jen *mevulo*; ĉu penseganton pri *dikuloj* nomi *dikululo*? Ne la tuta gramatiko, sed la **vortfarado** malpermesas duoblan aperon – de afikso.(*Prapranepo* – ĉu escepto?)

# Ni ne estas en krimromano

- Vi ne devos atendi la finon de la romano por ekscii la respondon al tiu demando pri *prapranepo*. En ĉi tiu prelego mi argumentos, ke la ripeta emfazo aperanta en *finfine* kaj *plenplena* efikas ankaŭ en ekzemploj kiel *prapranepo*. Sed bonvolu permesi, ke mi rezonu malrapide, penson post penso.

# Ne pensu afiksojn vortoj

Ne kredu, ke afiksoj estas vortoj, ke *fajreco* =*fajrkvalito*. Niaj ‘vorte uzataj afiksoj’ = vortoj kun sencogamo limigita. Kiuj estas *niaj istoj*? Diverslaboraj faristoj, tamen ne *fruktisto* aŭ *libristo*. Menciu *diversajn aĵojn*: mi ne pensos al *ŝafaĵo* aŭ *porkaĵo* inter tiuj *aĵoj*.

# La modeloj vortera kaj vortila

- Se vi pensas, ke vorto estas trančebla en *vorterojn*, tiam vin iom katenas la ideo, ke afiksoj = vortERoj. Por vin senkatenigi, pensu ke afiksoj = flankefiko de procedo kreanta vorton, de *vortILo*.
- Ekzemploj de vortiloj:
- *Xo/Xisto* (respondeca pri *libro/libristo*);
- *Xi/Xisto* (respondeca pri *kanti/kantisto*).

# Kial vorterismo ≠ vortilismo

- Eble *obsediton pri mevoj* vi nomus *mevulo*. Ĉu tamen *obsediton pri dikuloj* nomi *dikululo*? Jen la diferenco inter la vortera kaj la vortila modeloj. Kial pensanto pri pensanto pri germanoj ne nomiĝu *germanististo?* Vort***er***istoj ne scias. Sed vort***il***istoj bone scias, kial ne eblas diri *dikululo*, *germanististo*. Jen ilia klarigo – en la posta lumbildo.

# Formale klarigi la diferencon

- En la vortilismo, la pli informriĉa el la du templatoj havas prioritaton. Vi unue kontrolas, ĉu al *Xisto* konformas la kandidata formo (ekz. *germanisto*). Se jes, tiam vi aplikas la vortilon de dekstre maldekstren. Vi rikoltas la rezulton *Xo*, do *germano*.

# Formale klarigi la diferencon – 2

- Oni komparas la templaton *Xo* kun iu kandidato ***nur*** post kiam ĝi montriĝis malkonforma al *Xisto*. Tial *Xo* ne povas esti *germanisto*; tial *Xisto* neniam estos *germanististo*!
- Ĉu vi komprenas, ke ni ĵus derivis teoremon? Oni nomas tiun rezulton la ‘Strategi-Ombra Teoremo’!

# Hura, teoremo! Sed kion pri esceptoj?

- La teoremo nur pruvas, ke per la ordinara vortila aparato oni ne povas formi *germanististo*, *dikululo* aŭ *tablerero*. Tamen ankaŭ la vortilismo, per iuj ĉirkaŭvojoj, ja atingas vortojn kiel *prapranepo* aŭ *antaŭantaŭkolumba*. Oni bezonas aĉeti tiucele pli multekostan bileton – la vortilon *praXo/prapraXo* aŭ *antaŭXa/antaŭantaŭXa*.

# Kaj kial ĝuste tiaj ‘esceptoj’?

- Aranĝi biletojn por ‘esceptoj’, nu bone, sed kial estas ‘esceptoj’ kiel *prapranepo* sed ne kiel *rusististo*? Jen konjekto: *prapranepo* k.s. estas pruntoj el la matematika simbolfarejo en la homan lingvon. En ‘esceptoj’ ĉiam rolas rilatoj, kie reaplikita operacio identas al unuobla, ekz. >> = >; << = <. ***Semiotiko***, do! Ja ne gramatiko.

# Sinjor/in/eto venas sub-sub-suben!

- Semiotiko? Prenu alian ekzemplon. Tiu infaneto desupras laŭ ŝtuparo, malrapide. Vi klukas kuraĝige: *Sinjoreto (aŭ sinjorineto) venas sub-sub-suben!* Per tio vi signas tri ŝtupojn de la vojaĝeto. Sed via klukado ne trudas al via lingvo ian gramatikan regulon, ke ‘sub-sub-suben’ ĉiam ligiĝus al la alfrontado de tiu ŝtupara defio. Semiotiko denove.

# La semiotika dimensio

- Mi saltas trans kelkaj… ŝtupoj al la semiotika konkludo. Per tiu teoremo, la lingvo kreas lokon por semiotikumo. Se iu foje diras *tablerero* aŭ *laborististo* aŭ *problemeteto*, tiu sekvas la stilon de la konataj radikripetaj vortoj *finfine* kaj *plenplena*. Oni ne reaplikas la operacon, sed emfazas unuoblan aplikon.

# Mi al vi diradadas: dankon!

- Nomu la parolfiguron… adadismo, se vi volas!
- Dankon pro via atento.